



**3(181)  
2021**

# Apudvistula Bulteno

**de Krakova Societo ESPERANTO**

**Bultenon redaktas:** ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,  
**Adreso por korespondi:** str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Jan Twardowski

tradukis Lidia Ligęza

## Wielkanoc

– Już kaźdy ból był ze mną  
powiedział do ucha  
wszystkie rzeczy paskudne  
gęby nieżyczliwe  
krew uparta co z rany potrafi biec ciurkiem  
kuri  
czas jak ogień  
kiedy się głową chce potłuc o ścianę  
rozpacz

i nagle wiara jak krzyżyk na stole  
ze śmierci wszystkie chude i nierozpaczliwe ke ĉiuj mortoj magraj kaj ne senesperaj

## Pasko

– Jam ĉiu doloro estis kun mi  
ekflustris al la orelo  
ĉiujn hidajn aĵojn  
faŭkojn malfavorajn  
la sango obstina kiu el vundo scipovas likdaŭre  
  
tempo kiel fajro  
kiam oni per la kapo volas bati muron  
despero

kaj subite kredo kiel kruco surtable

## Baranek

Baranku wielkanocny coś wybiegł z rozpaczy  
z paskudnego kąta  
z tego co po ludzku się nie udało  
prawda że trzeba stać się bezradnym  
by nielogiczne się stało

Baranku wielkanocny coś wybiegł czysty  
z popiołu  
prawda że trzeba dostać pałą  
by wierzyć znowu

## Ŝafido

Ŝafido paska kiu elkuris despere  
el turpa angulo  
el tio kio laŭhome ne sukcesis  
vero ke oni devas fariĝi senhelpa  
por io mallogika fariĝu

Ŝafido paska kiu elkuris pura  
el cindro  
vero ke oni devas ricevi baston-baton  
por kredi denove

## Kwaidan. Rakontoj nekutimaj.

### Pri spegulo kaj sonorilo

Antaŭ ok jarcentoj sacerdotoj el Mugenyama en distrikto Tatomi intencis fondi sonorilon por sia templo, petis do virinojn de sia paroĥejo, por ili apogu ilian intencon kaj oferu por fandi malnovajn spegulojn el bronzo.

En tiu tempo en Mugenyama vivis juna, edziniĝinta vilaĝanino, kiu ankaŭ oferis sian spegulon por la sonorilo, sed tuj tion ekbedaŭris. Ŝi rememorigis al si, kion pri tiu spegulo rakontis ŝia patrino, kaj tion, ke ŝi apartenis ankaŭ al la avino kaj al la praavino, kaj ke ŝi estis plena de feliĉaj rememoroj kaj ridetoj, kiuj en ŝi respeguliĝis.

Ŝi estis tre malfeliĉa, ŝajnis al ŝi, ke senpense rezignis de parto de la vivo. Ŝi pensis pri malnova diraĵo, ke spegulo estas Animo de Virino, (sur multaj bronzaĵoj videbliĝas hieroglifoj signifanta animon), ŝi maltrankviliĝis kaj sentis, ke estas mistere kunligita kun la spegulo. Sed tamen ŝi ne kuraĝis interparoli kun iu ajn pri sia ĉagreno.

Kiam ĉiuj kolektitaj speguloj oni komencis fandi – unu el ili ne volis fandiĝi. Malgraŭ penoj ŝi rezistiĝis kontraŭ ĉiuj streboj. Evidente virino, kiu donacis ĝin al la templo devis pri tiu ago bedaŭri. Ŝi ne oferis ĝin tutkore, kaj ŝia memama animo daŭre al la spegulo ligita tenis ĝin dura kaj malvarma en la eno de la brulanta forno.

La famo pri tio disvastiĝis larĝe kaj baldaŭ ĉiu jam sciis, al kiu apartenis spegulo, kiu ne volis fandiĝi. La povra donacantino ne volante plu senti grandan honton – droniĝis. Ŝi postrestis tamen la adiaŭan leteron enhavantan ĉi tiujn vortojn: "Kiam mi mortos fandado de la spegulo jam eblos. Sed tiu, kiu batante en ĉi sonorilon detruos ĝin – estos de mia spirito pridonacita per la granda riĉo."

Kiam la sonorilo jam estis preta granda amaso da homoj venis en la templon, por en ĝin bati. Ili batis en ĝin uzante ĉiujn fortojn, sed la sonorilo okazis tre solida. Neglektante protestojn de la sacerdotoj homoj furioze batis en ĝin tago post tago kaj horo post horo. La bruo estis tia, ke sacerdotoj ne povantaj jam ĝin elteni ruljetis la sonorilon el la monteto en profundan marĉon, kiu ensorbis ĝin poreterne. Tia estis fino de ĉi tiu Sonorilo Mugen – restis nur la legendo.

Kiam la sonorilo estis jam en la marĉo malaperis ŝanco por ĝin disbati. Sed homoj kredis, ke agante laŭ la propra imago – t.e. imagante, ke diversaj objektoj estas ĉi tiu sonorilo – disbatadis ilin atendante promesitajn riĉaĵojn.

Virino je nomo Umegae kaj ŝia parenco samurajo Kajiwara foje vojaĝis komune kaj ek troviĝis en gravaj financaj klopodoj. La virino rememorigis al si pri Sonorilo Mugen, prenis bronzan pladon kaj imagante, ke ŝi estas tiu sonorilo bategis en ĝin ĝis ĝia krevo. En ĉi tiu ĝuste momento ŝi ekvokis pri tricent oraj moneroj. La gasto, kiu ankaŭ estis en tiu ĉardo, kiam ekkonis kaŭzon de la bruo kaj la tutan historion – ravita donacis al Umegae tricent ryo el oro.

Post ĉi tiu okazintaĵo Sonorilo Mugen fariĝis tre fama kaj multaj homoj imitis Umegae ankaŭ serĉante la feliĉon. Unu el ili estis malĉasta vilaĝano, kiu loĝis sur bordo de Oigawa prosime de Mugenyama. Perdinte la havaĵon pro diboĉoj li formis en ĝardeno modelon de sonorilo el koto kaj detruis ĝin postulante laŭte grandan riĉon.

Tiam elkreskis antaŭ li figuro de la virino kun malligitaj haroj, vestitan en blankon, tenantan en la manoj la kovritan potegon. Ŝi diris: "Mi venis por rekompenci vian ardan preĝon tiel, kiel ĝi tion meritas. Akceptu ĉi tiun potegon." Enmaniginte ĝin al la vilaĝano ŝi malaperis, kaj li, feliĉa, alkuris rapide hejmen, por komuniki al la edzino bonan sciigon. Li starigis antaŭ ŝi la potegon, kiu estis vere peza kaj ili ambaŭ komune ĝin apertis. Okazis tiam, ke ĝi ĝis la randoj plenigita estis... Sed ne! Vere mi ne povas diri al vi per kio ĝi estis plenigita...

## La tria provo

Sur la eraraj vojoj de mia vivo mi serĉis la veron kaj trovis nur fanatikan kredon aŭ ekstremajn ideojn, homojn kun maksimumo de delikata sentemo aŭ naivajn predikantojn pri moroj, pe-litajn per kanajlaĵoj aŭ indiferentajn cinkulojn.

En mia hejmlando, kien mi ĉiam revenis, mi ne plu volis resti. Mi estas berlinanino, estas nas-kita en 1938 j. La krime kaj brile ŝanĝigantan regurbon de la regno Tria mi ne plu konis. Alia Ber-lino restis en mia memoro: frakasita, tute konsumita de fajro, kie patroj estas sendintaj siajn edzinojn kaj filinojn sur la straton, por ekhavigi al si laŭ ĉiuj eblaj vojoj konservaĵojn, cigaredojn, panon kaj karbon; Berlino de la eleraĵoj bombardadoj kaj de la okupadaj trupoj estis la urbo de mia infaneco.

Mia patrino neniam mensogas; kaj tial mi scias, ke mia patro apartenis al tiuj malmultaj ger-manoj, kiuj estas ribelintaj jam ekde 1933 j. kontraŭ la svastiko. Mia patro devis prezenti sin mal-longe antaŭ la militeksplozo ĉe sia kompanio. Li ne sekvis la rekrutigan ordonon kaj fuĝis al la kam-paro. Ili tamen estas kaptintaj lin, kondamnintaj lin kiel dizertinton kaj poste sendintaj al Aŭŝvico, ili tie torturis lin dum monatoj, kaj li mortis kiel perfidulo de la Gvidanto kaj de la patrujo.

Mi havis fraton 15 jarojn pli aĝa ol mi. Li apartenis al la hitlera junulorganizo, avancis en la ŝirmstafeton kaj batale mortis en 1943 j. ĉe la orienta fronto. Paroli pri onkloj kaj onklinoj, kuzoj kaj kuzinoj ne havas sencon. Ili estis kiel la ordinaraj homoj de la germana nacio je tiu tempo.

Mi estis timema, timida kaj retenema, kaj kiel dekkvinjarulino mi opiniis esti trovinta la vojon de la vero en Jesuo Kristo. Al li mi estas direktinta min kun mia sentado kaj pensado, kun la tuta pasio de mia profunda kredo. Nur ĉe li mi volis esti, servi lin tage kaj nokte, en la pensado, en la preĝado kaj en la agado. Kaj mi iris en monaĥinejon. Malantaŭ la dikaj muroj, en la kvieteco kaj soleco, mi serĉis Dion en la preĝado kaj en la laboro – kaj ne estas trovinta lin.

Sep jarojn mi bezonis por fali el ekstrema pieco en ne malpli ekstreman ateismon. Kaj ree mi estis en Berlino, ĉe mia patrino, kaj miregis pri la pulsanta vivo en mia patruja urbo. Mi observis, kiel homoj subpremis la estintecon, kiel ili provis eĉ forgesi ĝin, kaj kiel aliuloj pretendis esti sciin-taj nenion. Mi dubis pri tio kaj serĉis plu.

En la oriento de mia patruja urbo regis la komunista partio, kies ideoj ŝajnis solvi ĉiujn proble-mojn de nia tempo. Mi eklegis: Kalon Markson, Frederikon Engelson, Leninon, Libknehton, Rozan Luksemburg, Trocki-n kaj Stalinon, kaj alia mondo malfermiĝis por mi, mondo, kiu fascinis min. Ĉu eble tio estis la vero? Mi legis tage kaj nokte. Mia patrino zorge rigardis min kaj estis emociita pri mia ŝanĝiĝo.

Berlino estis dividita per muro. La nekonataĵo transe de betono kaj dorndrata baraĵo allogis min. Centoj de miloj da homoj serĉis vojojn, kiuj kondukis el la oriento en la okcidenton. Mi kontraŭe apartenis al la malmultaj, kiuj iris el la okcidento en la orienton. Kun entuziasmo kaj nove vekiginta kredo mi lernis ekkoni la socialismon en la Germana Demokratia Respubliko. La partiaj kamaradoj min akceptis per malfermitaj brakoj kaj sentebla rekono. Por ili mi estis uzebla pruvo, ke sincera pensanto ne plu povas vivi en la kapitalisma okcidento. Oni ebligis al mi la politikan supre-niĝon, kaj oni asignis al mi unu taskon post alia.

Ree, mi estis certa, esti trovinta la veron. Antaŭ mi etendiĝis la socialisma mondo de Berlino ĝis norda Koreujo. Cent nacioj, cent lingvoj, kaj triumfanta ideo, kiu troviĝis en la batalo pro scio, progreso kaj paco. Mi estis ĉe Vistulo, ĉe Moldavio, ĉe Danubo, kie ĝi enfluas en la maron Nigran, ĉe Volgo, en la meza Azio kaj Vladivostoko, renkontis milojn da homoj kaj trovis malmultajn feli-ĉajn kaj konvinkitajn. Mi kontraŭe renkontis kontraŭdirojn, kontraŭaĵojn, frotaĵojn, malkontentecon, angoron, malesperon kaj apation en la senklasa socio, kaj tiel mi ekkonis la malrealaĵon kaj utopia-ĵon en mia naiva kredo. Mi trovis nek la liberecon, nek la egalecon aŭ la fratecon.

Elrevigita kaj sen iluzioj mi revenis en 1967 j. el Sovetunio al orienta Berlino. Ankoraŭ unu malvenko. Ankoraŭ malsukcesa provo trovi la veron. Nun mi devis serĉi ion tute alian, nome padon, malstreĉan ĉeneron en la maŝoj de la fera kurteno, fendon en la muro por reveni al la patrino. Kie kaj kiel mi estis trovinta tion, estas malgrava, ĉiuokaze mi ree albordiĝis en mia malgranda loĝejo ĉe mia dume maljuniĝinta kaj griziĝinta patrino.

Io tamen restis neforgesebla por mi, io, kio estis la plej emociinta en mia vivo. Mi estis estinta en Aŭŝvico, Treblinko, en Majdano, en Terezono, en Babi-Jar ĉe Kievo. La abismo de la sange avida fieco de nia jarcento, la fina solvo de la juda problemo, konsciigis al mi nur tie. Antaŭe mi estis sci-inta multe tro malmulte pri la suferoj de la judoj en la diasporo, kaj nur el la lerneja periodo kaj la

periodo en la monaĥinejo mi memoras la tezon, kiu responsigis la judan popolon tra generacioj pri la krucigo de Jesuo.

Ree mi komencis legi. Tiun ĉi fojon la Malnovan Testamenton kaj la historion de la judoj kaj de ilia persekutado de la antikvaj tempoj ĝis niaj tagoj, en kiuj estis efektivigita en Israelujo la profetaĵo pri la malnova nova lando de Teodoro Herclo.

Mi venis en tiun ĉi landon por esti konfrontata ankoraŭfoje kun vero, kaj trovis malgrandan ŝtaton kaj malgrandan popolon en la batalo por ĝia ekzisto, kontraŭ la volo de la arabaj popoloj kaj la indiferentecon de la mondo disdividita en sferojn de interesoj.

Mi miregis pri la infanoj, kiuj en la ĉelimaj loĝlokoj frekventas la lernejon kaj nokte devas dormi en bunkro, pri la verdaj oazoj en la senakva dezerto, pri la moderna industrio kaj agrokulturo kaj pri la enmigrintoj el ĉie en la mondo, kiuj estis irintaj multajn vojojn kaj rezignintaj pri ili por tie ĉi komenci de antaŭe.

Hodiaŭ mi estas sufiĉe matura por ne plu serĉi la objektivan veron. Mi provas vivi kun la israela subjektiva vero. En la kibuco ĉe la lago Tiberiada oni ankoraŭ hodiaŭ rigardas min kiel fremdulon. Mi tamen deziras iun tagon esti akceptata en tiu komunumo, por partumi en la promesita lando la sorton de la popolo elektita de Dio.

El la germana lingvo tradukis Rikardo Ŝulco

## La preĝo pri la prudento

Sinjoro, mi ne petas pri mirakloj aŭ miraĝo, sed pri la forto ĉiutage.

Faru min observema kaj sinhelpa, por mi en diverseco de ĉiutaga vivo post iu tempo vaste parolu pri malkovroj kaj eksperimentoj, kiuj min ekscitis.

Instruu min, kiel ĝuste disponi pri mia tempo. Donu al mi subtilan talenton listingi primaron de durangeco.

Mi petas pri la forto de abstino kaj mezuro, por mi ne svingu kaj ne traglitu tra la vivo, sed prudente planu la kuron de la tago, vidu pintojn kaj distancojn, kaj almenaŭ trovu la tempon por ĝoji pri la arto.

Helpu al mi kompreni, ke la songoj ne povas helpi. Neniajn revojn pri pasinto, neniajn revojn pri estonto. Helpu al mi esti ĉi tie kaj nune kaj pritraktu ĉi momenton kiel la plej grava.

Savu min de la naiva konvinko, ke ĉio en la vivo devas trakuri glate. Donu al mi klaran konscion, ke malfacilaĵoj, malsukcesoj kaj faloj estas nur la natura parto de la vivo, dank' al kiu mi adoleskas kaj maturiĝas.

Rememorigu al mi, ke la koro ofte kverelas kontraŭ la kaŭzo.

Sendu al mi en la ĝusta momento iun, kiu kuraĝas diri al mi veron, sed diri tion ame.

Mi scias, ke multajn problemojn oni povas finsolvi, eĉ se oni nenion Faras, do instruuj al mi paciencon.

Vi scias, kiel tre ni bezonas amikecon. Permesu al mi esti inda de tiu la plej bela kaj la plej tenera Dono de la Destino.

Donu al mi la riĉan imagon, por mi en la adekvata momento, en la ĝusta tempo, en la konvena loko, mute aŭ parole donacu al iu la bezonan varmon.

Faru de mi persono, kiu scias, kiel atingi tiujn, kiuj estas entute „sube”.

Savu min de la timo antaŭ pretergapi ion en mia vivo.

Ne donu al mi tion, kion mi deziras, sed tion, kion mi vere bezonas.

Instruu al mi arton de la „malgrandaj paŝoj”.

*Antoine de Saint - Exupery*